Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Marto 2002 73-a jaro, n-ro 3 (1161)

ISSN 1163.0442 MENSUEL/MONATA

Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

http://www.sat-esperanto.org/ *** retadreso: satesper@noos.fr

Esperantistoj estis videblaj en Porto Alegre



SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

El la redaktejo...



Karaj gekamaradoj,

Unue ni esprimas niajn plej korajn bondezirojn al ĉiuj niaj inaj membroj okaze de la Internacia Virina Tago - 8-a de Marto, kun espero ke pli kaj pli da esperantistinoj aliĝos al SAT kaj plifortigos (plibeligos) nian Asocion.

Tiu ĉi marta numero estas tre informa pri diversaj aktualaj okazintaĵoj. Krome ni enkondukis novan rubrikon : «El la ret@ SAT-diskutejo» kiu resume prezentas temojn kaj debatojn, kiujn en pasinta monato pridiskutis niaj membroj en Interreto. Tiel la gekamaradoj nehavantaj retaliron estos informitaj kaj povos eventuale daŭrigi la debaton en Sennaciulo. Mi esperas ke ĉiu trovos ion interesan.

Pensu pri aliĝo al la kongreso en kiu ni traktos tre gravajn temojn, kiuj certe estos decidigaj por la estonto de SAT


Plej kamaradece al ĉiuj,
via

Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@noos.fr.
TTT-paĝoj:
http://www.sat-esperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Krešimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

*

Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER
Abonnement annuel/jara abono France 52€
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.



Al niaj inaj kamaradoj gajan

8-an de Marto

deziras la Redakcio

NOVA PERANTO EN BULGARIO

Ĉar jam de pli ol du jaroj ni ne sukcesas havi kontakton kun k-do Damjanov en Bulgario kaj ne povas sekvi la kotizojn de niaj bulgaraj membroj, ni devis trovi novan peranton. Li estas:

DIMITAR KALĈEV
Ĵk «Javorov» 13-2
BG-1124 SOFIA
Bulgario

PERANTO EN ITALIO

Nia nova landa peranto por Italio, k-do Carlo BOURLOT, Via Quarello 40, IT-10135 Torino (TO), Italio havas ankaŭ novan poŝtbankan konton, numero 43976158. De nun bonvolu pagi vian jarkotizon je lia nomo al tiu nova konto.

KOREKTO DE ERARO

K-do Kurisu Kei, aŭtoro de la artikolo «Historio pri Krabŝipo» en la lasta S.R. atentigas pri grava eraro: En la paĝo 12, dekstra kolumno, linio 3 estas preseraro: *«socialfaŝistojn»* Devas nepre esti socialfaŝistoj, ĉar la aldono de «n» ja inversas la sencon. Bonvolu do korekti.

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon.

La Redakcio

El la Mondo

El Porto Alegre kaj Novjorko: KIA TUTMONDIGO?

En SAT, ĉi tiu demando ne praviĝas. Ni havas klaran ideon pri universaleco de la homaj valoroj, pri sennacieco por homara organizado kaj pri socialismo. La forumo en Porto Alegre montris la nebulecon de la konceptoj ĉe la partoprenantoj, dum en Novjorko (aŭ Davos) la vorto "tutmondigo" - globigo, oni diras, nun esprimas ideojn pri krevoj, katastrofoj, ĉar kiel diris la elstara, ŝatata de la liberecanoj de SAT, Noam Chomsky: "La vorto 'tutmondigo' estis alpropriĝita de la potenculoj por la defendo de siaj propraj interesoj". "Frato" Betto, tiu de la "liberiga teologio" ne hezitis klarigi kiel "en tutmondigo la ekonomio fariĝis ekonomio de kazino", kie la regado per ludo de kapitalisma spekulado okazas sur la verdaj feltoj de Monda Banko, Monda Organizaĵo de Komerco, borsoj kaj multaj aliaj.



Esperantistoj estis tamen videblaj en la manifestacio

Impresa partoprenantaro en Porto Alegre

La 2a Forumo Sociala Tutmonda okazis en Porto Alegre (Brazilio) de la 31a de januaro ĝis la 5a de februaro 2002. Oni atendis 50.000 partoprenantojn, je la fermo estis deklaro pri 80.000 homoj. El 4909 organizaĵoj venis 15.230 delegitoj de 131 landoj por pritrakti 26 ĉefajn temojn kun baza ideo: "Alia mondo estas ebla" sub sugesto inter aliaj de Bernard Cassen el ATTAC. Oni do diskutis dum 108 horoj el kio rezultis pli da kaloro (varmo – se vi volas) ol lumo, ĉar pro la diverseco de opinioj ne eblis venigi rezolucion aŭ konkludon, forestis iu "unika pensmaniero"!

Iom aparte estis organizitaj 800 seminarioj, specialaj kunsidoj kiel por urbestroj(200 aŭtoritatuloj), por juristoj (300 leĝuloj kiel inter aliaj Baltasar Garzon, la arestinto de Pinochet) kiuj pledas por efika tutmonda juro preter la nacioj... ĉu konscio pri sennacieco?

La "gravaj" partoprenantoj venis el Francio, kun 6 ministroj, 3 kandidatoj al prezidenteco, kiel Jean Pierre Chevènement, Noél Mamère. Notindaj ankaŭ estis nobelpremiitoj Perez Esquivel, Rigoberta Menchú, José Saramago, kiu ne hezitis taksi kiel kadukaj la formulojn de nunaj politikaj partioj.

Parti-politikaj celoj

La ĝenerala konstato de la ĵurnalistoj estas, ke ĉi tiu forumo en Porto Alegre fariĝis instrumento por la politikaj celoj de la "laborista partio"-PT, kiu regas la urbon mem, la provincon Rio Grande do Sul kaj ĉi jare celas la prezidentecon de tuta Brazilio kun la kompatinda tornisto Lula, jam la 3an fojon! Amuza demagogio estas la identigo al la socialista partio de Francio.

Tamen la amiko de Lula, Fidel Castro (ĉu socialisto, la dum pli ol 40 jaroj diktatoro?) estis barita sub influo de Bernard Cassen. Same malinvitita estis José Bové, kiu tamen, silente venis. Ankaŭ la Movado de Senteruloj ne havis oficialan programeron. La agitistoj estis entute limigitaj kaj nur povis sen malordo, diskrete manifestacii. Oni devis obei la oficialan porpacan marŝadon de PT. La frustracio de sindikatistoj, komunistoj, trockistoj, verduloj, (de betono) sektuloj el ĉiuj religioj estis granda. "Kaseroladoj" tamen malvigle okazis, ĉefe obee al argentinoj kaj ties bankroto, en ĉi tiu tutmondigita karnavalo de PT, konstatis ĵurnalistoj.

Sed PT pagis, kaj kiu pagas, regas. La urbo mem elspezis (oficiale) R$18,4 mil, kaj la ŝtato R$2,3 milionojn (entute + 1,5 milionoj da eŭroj). La urbestro Tarso Genro en sia "ebla utopio", insistas pri iu nova ordo sen Usono, sed li aldonas: "... la socialisma projekto ne estas sufiĉe klara. Ni devas reagi al la merkato kaj elimini la spekulan kapitalon..."



Araboj en marŝo

Luiz Inacio da Silva (Lula) en sia demagogia retoriko aldonis: "Estas eble, ke tie (en Novjorko) oni diskutas, kiel akumuli pli da riĉaĵoj. Ni, pli bone volas dis-

tribui la ekzistantajn riĉaĵojn..."

ALCA – Areo de libera komerco de Amerikaj Landoj, estis kondamnita, ĉar potenco, povo, kiuj funkcias apogitaj en kapitalismo, tradicie sin legitimas uzante krizojn kaj konfliktojn por pravigi la ekonomikan agadon.



Alia mondo eblas - ESPERANTO

temas pri politiko de aneksado al Usono.

Elstaraj pensuloj

Intence, el Usono oni invitis Noam Chomsky laŭdire la malpli usoneca usonano, profesoro el MIT (Massachusets Instituto pri Teknologio) kaj Michael Hardt, pli juna profesoro, verkisto.

Kvankam Chomsky ĉi-foje ne tre verve sin esprimis, notindaj estas la jenaj diroj:

-Usono estas la vera teroristo el tutmondo.

-Post la Afgania milito, venos pliaj kruelaĵoj.

-En realo la forumo kontraŭ tutmondigo estas tiu de Novjorko.

-La riĉaj landoj profitas de la krizaj momentoj por pli draste subigi la malriĉulojn.

Li ankaŭ laŭdis la ministron pri sano, José Serra, kandidato por anstataŭi la nunan brazilian prezidenton, kiu havis la kuraĝon produktigi medikamentojn sen atenti pri la patentoj de kapitalismo. Jen imitinda sinteno: forigi aŭtorrajtojn kaj patentojn! – instrumentoj de homekspluatado kaj mizero.

M. Hardt klare diris: "La historio pri formoj de Temas ankaŭ pri mekanismo de socia regado."

Juan Samovia el OIT (Organizaĵo Internacia de Laboro) konstatis, ke estas tempo "ne vidi la laboron kiel varon..."

Argentinio, kiu de 10 jaroj sekvis la fablon de Ezopo kaj Lafonteno pri la bufo (rano) kiu volis esti granda kiel bovo (unu dolaron egalas unu peso!) kaj krevis, estis analizita kun granda timo same en Novjorko kiel en Porto Alegre. K. Jakóbsen ne hezitis esprimi, ke Argentinio estas simbolo pri la malsukceso de la tielnomata Novliberalismo.

Ne tiom elstara, pli folklora estis la "agreso per kukoj" al la franca komunistino Marie-George Buffet post parolado. Anarkiistoj (ĉu vere tiaj ili estis?) ĵetis du kremtortojn en la vizaĝon de la ĵurasa maldekstrulino! Ni facile povas imagi, ke se la modo trafas SAT-on, ne estos sufiĉe da bakistoj en avenuo Gambetta!

Iom pri Novjorko (Davos)

Estas bone rememori en la nuna 31a Forumo Ekonomika Monda (FEM), ke la unua okazis en 1971 en Davos (Svisio) post la perdo de la keynes-ana ekonomika influo. Ĝi markis la fortiĝon de la "elsaviga" novliberalismo, kun la supozita "unika pensmaniero" aparte post la falo de la berlina muro... Estas do la plej lasta formo de akaparado, de spekulado fare de kapitalismo, kiu en ekonomiko pseŭde scienca ne plu atentas pri la vera scienco, t.e. ekonomio. Estas la nova fundo de l'mizero, kiu feliĉe situas en agonia stertoro. La rompoj inter civilizaciaj valoroj kun la 11a de septembro 2001, la nuna bankroto de la sistemo en Argentinio, la korupta, fraŭda bankroto de la potenca "Enron" en Usono mem, estas kelkaj el la pruvoj pri la fino de la multekosta sistemo kiun la forumo unufojon plian provas fliki.

Multekosta ĉar ĉiu membro de la klubo FEM, pagas jaran kotizon de USD 17647 (+400-oble la SAT-kotizo de Francio!) kaj individue USD 7.353 por la partopreno en la forumo. Kaj la 12 ŝtatestroj, 276 elstaraj kapitalistoj, plus 10.000 invititoj kun plenaj monujoj, sen paroli pri regantoj kiel Cargill, Coca-Cola, la Monda Banko, Bill Gates k.a. sendube pisas en siaj pantalonoj pro timo ĉar ili pagis pliajn USD 11milionojn al 40.000 policistoj por sekureco. Oni ne aŭdis pri arestado en Porto Alegre. En Novjorko ŝajne pli ol 200 manifestaciantoj el 200 NRO-oj (Ne Registaraj Organizaĵoj) kiuj reagis al FEM, la "febla ĉenero" – alude al iu fama TV-programo, areste alfrontis kolbojn se ne kuglojn.

La solvo, por la FEM-anoj fronte al la klamado de la malsatantaj popoloj estas, kiel ĉiam, kaj laŭ la sanktaj biblioj aŭ noblaj koranoj, almozo: iu baza nutrokorbo de tempo al tempo kaj USD 30 aŭ 40 jare al ĉiu persono por sano. Jen, la ordigo, la gettigo de senlaboruloj kaj eternaj mizeruloj! Kaj ni perfekte komprenas, ke ne ĉiuj kapitalistoj povas aŭ volas, kiel Bill Gates, almoze disdoni USD 24 miliardojn por savi la mondon.

Vere amuza en Novjorko estis la viciĝo de ĉi tiuj "elituloj" por almoze (donace) ricevi poŝkomputileton... Ne malpli pitoreska estis la ĉeesto de brazila plej legata kompreneble mistika romanisto Paulo Coelho, kiu eniris la fermitan klubon de kapitalistoj danke al... aŭtorrajtoj!



Brazila esperantisto - inter la banderoloj

Mistika kaj naiva estis la sugesto de prezidento de Peruo, Alejandro Toledo por konstrui ponton inter Davos (Novjorko) kaj Porto Alegre ĉar inter la du urboj estas ne transpaseblaj abis-

moj ne nur pro riveroj kiel Hudson kaj Guaiba, kiel Rio Negro, Orinoko, Amazono aŭ San Francisko, sed pro fluoj de la homa stulteco mem.

Klara socialismo

La tuta Forumo Sociala Tutmonda, efektive montris, ke neniu havas klaran koncepton pri socialismo, kiel diris urbestro Tarso Genro. Neniu funde konscias pri la ĉefaj kialoj de fiaskoj de la antaŭaj socialismaj provoj kiel la diversaj komunismaj reĝimoj. Neniu kapablas vidi, ke la kaŭzoj de tiuj fiaskoj estas entenataj en la homaj sintenoj mem, kaj ke la "revolucio" devas okazi unue ene de ĉiu kaj ĉiuj individuoj. Neniu pretas akcepti, ke la regado en socialismo ekiras de la individuo al la kolektivo kaj ne de kolektivo al la individuo. Kolektivo nur povas esti sumo de kaj da individuoj.



Ili ĉiuj proponas nian lingvon

La principo, libereco – egaleco – frateco estas nur principo. La socialisma ideo de Markso (Karl Heinrich Marx – 1818-1883) sendube estas trafa:
"El ĉiu, laŭ sia kapablo. Al ĉiu, laŭ sia bezono."

Ke "la laboriloj, produktiloj devas aparteni al tiuj, kiuj produktas" estas entute evidenta afero por eviti la homekspluatadon. Mi ne povas plilongigi ĉi tiun tro longan raporton, sed mia menso neeviteble bolas post la kelktaga iom tro atenta akompanado de la forumoj, mi (kaj mi devas uzi la pronomon – mi) nur diros tion kion la forumo ne diris kaj ne volis pensi por atingi socialismon:

-Preterlasi, ne atenti, ne kredi pri la plej granda monstro kiun la homoj kreis: la ŝtato; en kiu prosperas ĉiuj homaj mankoj, kiel korupto, ŝtelemo, burokrataĵo, oficiala sklavigo kun impostoj, ktp.
-Ne uzi la "opion de la popoloj", la religiojn kun dogmoj, kiuj manipulas la feblan homan menson. La kredoj nuligas la racion. Religioj subtenas la ŝtaton.
-Abolicii la uzon de mono kiel trezorigebla varo, mono eventuale restu kiel interŝanĝilo de produktoj.
-Rigardi la kapitalon nur kiel laborinstrumenton apartenanta al tiuj, kiuj uzas ĝin en koopera organizado.
-Prefere kooperi anstataŭ kunlabori.
-Memstare sin organizi en malgranda kolektivo cele al atingo de memsufiĉeco ekz. en kooperativoj ekster la ŝtata influo.
-Sekve, individue sin klerigi, sin instrui por esti kapabla. Konscii ke "laboro" ne estas ofendo sed neceso de homa vivo por kontentigo de homaj bezonoj.
-Atingi memkontrolon en la aktivecoj por detekti eventualajn homajn mankojn kaj ilin minimumigi, sen specifaj policadoj.
-Investado estas facile atingebla per kromlaboro kaj ŝparado... eĉ sen mono. (Mi havis sperton pri ĉi tio).

Mi ne longigas nun la liston ĉar pluraj forumoj estus necesaj por ĵeti iom da praktika lumo. Sed laŭ mi, tio estas la "rekta agado" ebla. Ĵetado de kukoj, "kaseroladoj", skuado de banderoloj kaj similaj manifestacioj restas vanaj, fronte al la surdeco de la nunaj sistemoj.

Gilbert Ledon

ALIA FORUMO EBLAS

La Dua Monda Socia Forumo (MSF) kiu okazis en Porto Alegre de la 31a de januaro ĝis la 5a de februaro 2002 estis reformisma laŭ ekonomia vidpunkto (ĝi celis ne la finon de kapitalismo sed ĝian reformon), tradicia en la politika aspekto, kaj rezignaciema pri la sociaj problemoj.

La «oficiala maldesktro» kiu organizis la eventon klopodis profiti el la movadoj kontraŭ la tutmondiĝo kiu kontraŭstaris al potenculoj de la mondo en Seatle, Prago kaj Ĝenevo kaj uzi la Forumon kiel montrofenestron por tiuj grupoj de rektaj agadoj.

La MSF okazis sub la auspicioj de la amaskomunikiloj kaj sub la aplaŭdoj de la kapitalistoj (okazis «dialogaj» ligoj per konferencoj inter la Forumo de Porto Alegre kaj la Ekonomia Forumo de Nova Jorko). La oficiala maldekstro (la maldekstro kiun la kapitalistoj permesas) estis obeema kaj lernis bone la lecionojn de la «leĝo de la merkato» kaj de la leĝo de la Ŝtato kaj bone servas al la reganta klaso, ĉar tiu maldekstro oficiala, kunordigis la protestojn por ke ili oka-



Paralela ribela manifestacio en Porto Alegre

zu obeeme kaj sub kontrolo de la Ŝtato. La Forumo proponis falsan dialogon: en ĝi estis miloj da homoj el ĉiuj kiuj obeas.

La MSF estis spektaklo en decida momento por la kapitalisma sistemo kiu celis forĝi socian demokratian pakton kiu ebligus bremsi la protestajn mondajn movadojn kontraŭkapitalismajn sub la fidelaj gvidadoj de la «oficiala maldekstro de la kapitalismo». Ekde la protestoj de rektaj agoj kiuj okazis en Seattle, Genova kaj Prago, la oficiala maldekstro provis «ordigi la protestojn» aŭ kontroli la ribelemon por akordigi ilin al instituciaj modeloj. La MSF do estis organizita laŭ vertikala kaj ordonema strukturo kaj stimulis la forumanojn agi sammaniere en la socio per falsa dialogo cele al konservado de la hierarkioj.



La ribelulojn kaj malkontentulojn reprezentas junularo

kontinentoj, Neregistaraj Organizoj (eĉ izolitaj esperantistoj*), religiaj grupoj, specialistoj, studentoj, sindikatistoj , kaj multaj homoj kiuj iris tien por fari politikan turismon.

Sed el kio rezultis la spektaklo? En la MSF oni petis reformojn en kapitalismo, plibonigadon en la ekologio, kaj postulis pli da mono por sociaj problemoj, pli da demokratio, pli da civitaneco, kondiĉe ke ne estu rompoj en la nuna monda ekonomia ordo. La MSF estis loko kie la homoj estis dividitaj, inter tiuj kiuj parolas kaj tiuj kiuj aŭskultas, inter tiuj kiuj decidas kaj tiuj

Ne ĉiuj tamen same partoprenis la spektaklon. Kelkaj ribelemuloj laŭeble praktikis rektajn agojn, partoprenis la ribeleman marŝon, flanke de la oficiala marŝo, kelkaj estis arestitaj pro la ribelemo, aliaj klopodis invadi forlasitan domon por krei la sidejon de la paralela forumo, oni ĵetis torton sur la francan ministrinon, ktp...

Tamen kelkajn tagojn antaŭ la Forumo, la prezidanto de ABONG, Brazila Asocio de Neregistaraj Organizoj, Sinjoro Sergio Haddad, asertis ke «la MSF forpelas la spiriton de Seatle kaj ke ĝi estos bone edukita kunsido». Tio signifas ke la Neregistaraj Organizoj ankaŭ estas reformemaj, kaj ke ili estas hierarkiecaj kaj ne aŭtonomecaj organizoj. Ni substreku ke la «spirito de Seatle» estas liberecana, dum la NROj ne estas. Kaj certe la multnaciaj entreprenoj kaj kapitalismo estos por ĉiam niaj malamikoj eĉ se la nuna sistemo sukcesos forpeli la mizeron kaj la malsaton de la mondo.

Joao Manoel Aguilera Junior
Brazilo

* Brazila Esperanto-Ligo ne oficiale partoprenis la MSFn same kiel ne stimulis la membrojn al partopreno.

PENSU PRI LA ELEKTO DE LA NOVA P.K. !

SENDU GUSTATEMPE VIAN KANDIDATECON !

LISTO DE KANDIDATOJ APEROS EN VENONTAJ SENNACIULOJ

Pri la laboristmovada ekspozicio

En numero 11/ 2001 de Sennaciulo oni informis pri ekspozicio dediĉita al la historio de la laborista Esperanto-movado.

Bedaŭrinde mankis ĉiu ajn informo, de kie venas tiu ekspozicio kaj pri la materialoj ligitaj al ĝi.

Ĝin produktis en 1993, kune kun kelkaj esperantistaj fakuloj, la Fritz-Hüser-Instituto pri germana kaj eksterlanda laborista literaturo, (Ostwall 64, D-44135 Dortmund). En tiu instituto troviĝas bone flegata kaj daŭre kreskanta tre valora kolekto de materialoj pri la laborista Esperanto-movado. Honorofice pri la kolekto okupiĝas Jiri Proskovec (proscovec@mac.com).

La Instituto eldonis jenan volumon:

Ilustrita historio de la Laborista Esperanto-Movado. Al la laboristoj en ĉiuj landoj unu lingvon ! Illustrierte Geschichte der Arbeiter-Esperanto-Bewegung. Den Arbeitern aller Länder eine Sprache. Dortmund: Fritz-Hüser-Institut, 113 p.

La libro enhavas dulingvajn kontribuojn (Esperanto kaj la germana) de la instituta direktoro Rainer Noltenius (la Instituto kaj la kolekto), Eduard Weichmann (kroniko de la historio de LEA - cetere li fondis la kolekton), Jiri Proskovec (la Eo-arkivo en la Instituto), Ulrich Lins (esperantistoj en la hispana intercivitana milito) kaj de Detlev Blanke (pri la historio de GLEA, krome bibliografio pri la historio de LEA).

Krome aperis bela kolekto de 8 poŝtkartoj (kvar koloraj) kun motivoj el la laborista Eo-movado. (La kolekton en 1996 eldonis la Instituto kune kun Monda Kunagado kaj [germana] Libera Esperanto-Asocio).

Ambaŭ materialoj estas riceveblaj aŭ rekte de la Instituto (helpe de s-ro Proskovec) aŭ ĉe UEA kaj ĉe SAT.

Detlev Blanke
(blanke.gil@snafu.de)

SAT-KUNVENO dum la 18-a somerkursaro en Perto, Aŭstralio



Estis malfacile trovi en la horaro de la somerkursaro konvenan spacon por ebligi al kiel eble plej da partoprenantoj ĉeesti la SAT-kunvenon. Ĝi okazis sabaton la 12-an de januaro 2002 posttagmeze kaj pro tio nur dek-unu homoj kunvenis: kvin SAT-anoj kaj ses ne-SAT-anoj. Inter tiuj, kiuj ne estas membroj de nia asocio, troviĝis novbakita esperantista junulo scivolema pri la esperantista movado kaj ties asocioj kaj malnovaj esperantistoj, kiuj jam havas sian ideon pri la asocio.

La prezidanto kaj SAT-peranto, Bernie Heinze, petis ĉiun membron klarigi kial li aŭ ŝi elektis iĝi SAT-ano. Marcel Leereveld faris sintezon, priskribante SAT kiel organizo, organizita mondskale, ne akceptanta limojn inter landoj kaj referencanta al horzonoj. La celo de la SAT-anoj estas liberiĝi de siaj naciecaj pensoj por pensi sennacie kaj superpolitike. Ili batalas por pli egaleca socio kaj libereco. Li klarigis ankaŭ la cirkonstancojn en kiuj SAT estis fondita en 1921.

La lasta numero de la organo "Sennaciulo" kaj "Sennacieca Revuo" estis trafoliumitaj kaj okazigis komentojn pri la nunaj klopodoj por helpi Billy Waldon kaj la membroj de la asocio "Portos", pri la rilatoj kun Amnestio Internacia kaj Pen.

Ralph Harry enketis pri la eldono de PIV, kiun ĉiuj senpacience atendas.

La partoprenantoj ĝojis pri la fakto ke, ĉu membro de SAT aŭ ne, ĉiu havas la ŝancon sin esprimi en amika etoso. Ni finis la kunvenon per komuna redaktado de mesaĝo al la sidejo de SAT okaze de la forpaso de nia kamarado Yves Peyraut.

Franciska Toubale

Ni memorigas al gekamaradoj, kiuj havas retaliron, ke niaj TTT-paĝoj estas konsulteblaj per nia nova domajnadreso:


sat-esperanto.org

Se vi havas ideojn pri plibonigo, vi ne hezitu komuniki ilin.

Martin Luther King (MLK)-a Tago en Florido 21-an de januaro 2002

Mi ĉeestis la lokan MLK-a Tagon ĉe Mellon Parko, Sanford, Florido. La evento okazis ĉe la fina vojo de la afrika-usona parado, apud Lago Monroe (efektive la lago estas parto de tre longa Sankto Johanno rivera sistemo en Florido). Mi ne frue alvenis tien por vidi la tutan paradon, kvankam mi povis aŭdi la ĉefan aŭton kiel ĝi pasis. Ĝia laŭtparolilo estis muntita sur la tegmento de la aŭto, dissendante iajn tre konatajn paroladojn de Doktoro King.

Mi alvenis tagmeze kaj mi povis aŭskulti la parolantojn kaj rigardi la tutan scenejon. Mi iris al la centro de la parko kie ĝi okazis. Estis nenia loko por parki mian aŭton, sed tio ne estis problemo por mi, ĉar mi konservis



mian biciklon en mia aŭto kaj mi povis parki duon-kilometre fore, rajdante mian biciklon en la mallonga distanco.

Estis almenaŭ kelkaj miloj da homoj. Verdire, mi supozas la nombron ĉirkaŭ 2000 aŭ 3000 laŭ mia pritakso. Certe mi konsterniĝis pri la granda plimulto de afrikusonaj homoj, sed dum nenia okazo mi sentis min malkomforte aŭ malkonvena. Mi estis tre komforta en la mezo de la feliĉa amaso da homoj.

Ĉiuj estis afablaj. Kaj ĝenerale, pri la blankuloj kiujn mi vidis, ili estis policanoj, kaj kelkaj policanoj elstaris sur la podio, zorge rigardante la homamason. Estis la policanoj kiuj ŝajnis malkonvenaj, starante apud la religiaj pastraroj kiuj adresis sin al la plimulto, per kelkaj preĝoj.

Unu policano, blankulo, faris ian paroladon. Li

menciis pri la virtoj de bona civitaneco, aŭ ion similan al tio. Lia elstaranta 9-milimetra manpafilo, ligita al lia taliozono, ŝajnis iomete stranga en ĉi tiu pacema evento. Mi ne atentis la policanon aŭ lian negravan paroladon. Ĉar malgraŭ ĉio, estis la policanoj kaj la usona sekreta spiona organizo kiuj konspiris murdi Doktoron King la 4an de aprilo 1968 en Memfiso, Tenesio, Usono. Kvar jarojn antaŭe, li ricevis la Nobelan Pacpremion por sia estrado kaj estreco en la principoj de neperforta protesto. Origine la movado de la hindia sendependeca ĉefo, Mahatma Gandi.

Sekvinte alian religian preĝon, ia ĉefo de la usona «NAACP» (angle, National Association for the Advancement of Colored People, aŭ esperante, «Nacia Asocio por la Progreso de Kolora Popolo») parolis dum mallonga tempo. Li memorigis pri la pli fruaj jaroj, kiam estis kontraŭleĝe por la nigruloj, organizi popularan eventon kiel ĉi tiu en ĉi tiu urbo. La policanoj simple metis ilin en malliberejon. Aldone, la NAACP-a parolanto rememorigis nin, ke la ago de voĉdono ne estis bagatelaĵo, aparte konsiderinte la farson de la novembro 2000, dum usona balotkampanjo.

Estis la eks-prezidento Ronald Reagan kiu oficiale proklamis la MLK-tagon registara feriotago en 1983. Mi rememoras, kiam prez. Reagan aperis sur la televida ekrano, kiam estis granda premomovado por fari la tagon kiel oficiala ferio, la trian lundon de januaro. Tio ne estis la ideo de Reagan. Fakte li sentis malinklinon por oficiale apogi la leĝon kaj li denuncis MLK kiel «komunista». Nur per la premo de persistaj homoj oni atingis tion.

Estis bonega evento. La plej impona afero, por mi almenaŭ, estis la fakto ke la eventon partoprenis tre granda nombro da gejunuloj. Estis juna muzika grupo kaj dancistoj. Ŝajne, ĉiuj venigis siajn tutajn familiojn, inkluzive la gefilojn. Kaj la NAACP-a parolanto diris, ke ĉi-jare, la homamaso ŝajnas esti pli granda ol en antaŭaj jaroj. Tio pruvas, ke ideojn kaj revojn estas malfacile mortigi.

Nathan M. Ganth

PRI MILITO KAJ PACO

La 27-an de januaro aperis en «Akahata» (Ruĝa Flago), la ĉiutaga organo de Japana Komunista Partio du rimarkindaj artikoloj pri milito kaj paco, miaopinie diskonigendaj tutmonde. Mi do rapidas esperantigi ilin por publikigo en Sennaciulo.

1. ROMO, la 26-an de januaro SIMADA Minetaka, korespondanto de «Akahata».

Laŭ informo el Jerusalemo, 52 rezervaj anoj de la israela armeo publikigis en la gazeto «Haarec» de la 25-a de januaro proprakoste, sian komunan opinion, ke la agado de la israela armeo ĉe la okcidenta bordo de Jordana rivero kaj en la distrikto Gaza havas nenion komunan kun la sekureco de Israelo, tiel ke ili deklaras, ke ili rifuzas la militservon postulatan de ili.

Laŭ ilia opinio citita de la presagentejo ANSA ili emfazas : «Ni ne plu volas superregi, forpeli, mizerigi kaj ofendi la Palestinanojn" kaj diras: Kompense al la okupacio la israela armeo perdis sian homecon kaj la israela socio putriĝis», kaj «Ni ne plu volas partopreni en la subpremado de la palestina popolo». Kaj ili ankaŭ asertis, ke la israelanoj forlasu la koloniigitajn teritoriojn.

Inter la subskribintoj de tiu anonco laŭdire trovigas eĉ altrangaj oficiroj.

Ja unuafoje ekde la tempo, kiam komenciĝis la kolizioj inter la israela armeo kaj la palestinaj loĝantoj, publikiĝis opinio de rifuzo de la militservo. ANSA indikas, ke kreskas malaprobo de la okupacio inter la soldatoj kaj la rezervaj anoj de la israela armeo.

2. En la kunveno kiun okazigis la plenumkomitato de la grupo "Pacondoj" kies prezidanto estas YOKODE Katuhiko, la 26-an de januaro en la placo de la okcidenta fortreso de la kastelo de Wakayama, la ĉefurbo de la gubernio Wakayama, kun la signalvortoj «Ĝis ekfluos la melodio de 'Imagine' (Imagu) en la koroj de la popolanoj», alvokis s-ro TARIQ Muhammad, 27-jara pakistana diplomato, kiu nun studas la japanan lingvon, jene :

«Mi venis ĉi tien ne kiel diplomato sed kiel individuo, kiu bone konas Afganistanon. Estiĝis du milionoj da rifuĝintoj pro la invado en Afganistanon de la estinta sovetunia armeo kaj unu miliono da rifuĝintoj pro la milito fare de la usona armeo, laŭdire por venĝi la viktimojn de la terorista agado de la 11-a de septembro pasintjare. Multaj el ili venis ankaŭ en mian hejmvilaĝon. Mi vidis per miaj propraj okuloj, ke ili eĉ ne havas ion por manĝi kaj kie loĝi».

Kaj li emfazas : «Pacon oni ne povas akiri per venĝmilito. Konflikto estas solvebla nur pace, kiel estas skribite nigre-sur-blanke en la Ĉarto de UNO». Kaj li konkludis : «En la nuna situacio eĉ infanoj vivas malfacile. Por reakiri pacon estas necesa kunlaboro sur tutmonda skalo. Mi atendas multon de Japanio, kies popolanoj bone konas, kiel terura estas milito».


KURISU Kei, Japanio

NDLR: La 20-an de februaro la sama gazeto «Akahata» (Ruĝa Flago) - 16-paĝa ĉiutaga gazeto, aperigis rimarkindan artikoleton pri la E-traduko de «Krabŝipo», kiu kontribuis al la traduko slovaken, kaj ke ĉio estas klarigita en la lasta numero de «Sennacieca Revuo» Ili aperigas la foton de la frontpaĝo de nia S.R. kaj la informon pri SAT kiel mondorganizo de la laborista esperanto-movado. Ni aperigos esperantan tradukon de tiu artikolo el «Akahata» en la aprila numero de Sennaciulo.

La nigra diamanto

Striko de diamantlaboristoj en Antverpeno

En 1947, la reprezentantoj de la diamantindustrio traktis, kun la tiama ministro pri laboro, Camille Huysmans, pri maniero revigligi diamantkomercon en Belgio. Ambaŭ partioj faris ĝentlemanan interkonsenton en kiu ili interkonsentis ke parto de la vendado de diamantoj estu libera de imposto kaj aldonvalorajôj. La decido estis ege grava por la komerco kaj malhonesta el konkurenca vidpunto. Sed ja libera merkato ne havas regularon de honesteco. Post la interkonsento, la diamantprilaboristoj ricevis, preskaŭ oficiale, parton de sia salajro por kiu neniu imposto estis pagata. Estis nur kelkaj «plenduloj» kiuj bruis pri tio, kaj la plej grandparto sentis sin tute komforte kun la situacio. Ja, iom forŝteli de la ŝtato, ĉu tio ne estas vivcelo de ĉiuj?



La parta liberigo de imposto al komerco kaj salajro, estis ekde tiam memevidenteco. Neniu persono kiu havis ion komunan kun la diamantoj en Belgio parolis aŭ faris al si zorgojn pri la malhonesta agado. Ne nur oni forŝtelis monon de la ŝtato, oni eĉ povas aplaŭdi tion, ĉar neniu ŝtato ĝis nun honeste uzadas impostan monon, sed kiu gravas forŝteligas monon de la sociala sekureco, kiu estas grava piliero de la «sistemo».

Jen alia parto de la historio de la belga diamantmondo. Taŭga sociala sekureca sistemo ne ekzistis en Belgio por la diamantprilaboristoj. Post dumsemajnaj palavroj inter la reprezentantoj de diamantestroj kaj sindikatoj, decidiĝis la striko. En 1957-'58, la diamantprilaboristoj strikis preskaŭ 10 semajnojn por havi la «socialan fonduson» kiu devas protekti ilin dum tagoj de malbonŝanco. La sociala fonduso estas la saveto kiam laboristoj el la diamanto estas malsanaj aŭ senlaboraj. Kvankam la diamantsindikato ADB estis, antaŭ la militoj, unu el la plej fortaj kaj avangardaj sindikatoj, ĝi perdis post la dua milito ĉiun brilon, povon kaj elaston. ADB fondiĝis kiel unu el la unuaj sindikatoj en Belgio. Unue kiel Anarkiista Diamant Sindikato, rapide ŝanĝita al Antverpena kaj poste Algemene (Ĝenerala) Diamant Bond (sindikato).

La laboristoj faris bonan strikon ĉar la rezulto estis starigo de «Sociala Fonduso por diamanto». La komencan kapitalon donis la fama sindikatestro kaj politikisto Louis Major, dum jaroj unu el la plej famaj sindikatestroj el Belgio. La «Sociala Fonduso por Diamanto» ricevis en 1958, 4 milionojn da belgaj frankoj kiel startkapitalon (pli ol 99.000 eŭroj). Ekde tiam diamantprilaboristoj kiuj grave malsanas ne plu devis timi malsaton kaj mizeron.

La diamantpolvo, kiu liberiĝas dum ŝlifado estas ege agresema kaj multegaj ŝlifistoj mortis pro pulmo-kancero. Ankaŭ aliaj pulmaj malsanoj trafis la ŝlifistojn, kaj por helpi ilin ekzistis jam dum jaroj «Zonnestraal». Iniciativo de la socialista sindikato subtene al pulmo-malsanuloj. Ĝi daŭris ĝis komence de la jaroj 1980 antaŭ ol oni instalis suĉsistemon por iom protekti la sanon de la ŝlifistoj, dum la senutila laboro kiun ili faras.

Por iom skizi la etoson en la diamantmedio, la sindikatoj devis batali 8 jarojn antaŭ ol la estroj instalis suĉprotektilojn kontraŭ polvo. Okazis ke en unu jaro mortis 12 laboristoj pro pulmokancero.

Komence de la jaro 2001 la sindikatoj komencis diskuton kun la reprezentantoj de la diamantestroj por negoci pri nova CAO (Ĝenerala Labor Interkonsento). En Belgio la sindikatoj devas pridiskuti ĉiujn du jarojn GLI (ĝenerala laborinterkonsento) por ĉiuj sektoroj. GLI protektas ambaŭ flankojn kontraŭ arbitro de unu aŭ alia flanko.

Je la flanko de la sindikatoj sekvaj postuloj estis la plej gravaj: Frua emeritiĝo ekde 58 jaraĝo; eblo al tempo-kredito (ebleco labori ekz. 4 kvinone aŭ 3 kvinone) kaj plialtigo de la salajro de 2,50 eŭroj semajne.

Jes evidente 2,50 eŭroj estas ridinda sumo, rilatas nur pri po 0,0625 eŭroj hore. La kialo de ĉi tiu altiĝo estis ke la diamantprilaboristoj ne plu ricevis plenan senlaborkompenson aŭ malsankompenson ĉar la salajro estis tro malalta.


Post longaj kaj malfacilaj diskutoj la estroj volis plialtigi la salajron de 1,25 eŭroj aŭ po 0,03125 eŭroj hore, do daŭre ne sufiĉa por havi nian plenan senlabormonon se necesas.

Proteste al ĉi tiu decido la laboristoj en la diamantkvartalo de Antverpeno manifestaciis dum la tagmanĝa paŭzo de la 14a decembro 2001. La manifestacio, kun pli malpli 500 partoprenantoj, estis el la vidpunkto de la sindikatoj granda sukceso. Nur restis eta problemo, la estroj ridis pri nia promeno tra la kvartalo kaj ne subskribis novan GLI-on.

Komence de januaro 2002, la sindikatoj alvokis la membrojn al ĝenerala kunsido, kie ili proponis unutagan strikon. La laboristoj povis libere doni sian opinion kaj mi ricevis tondran aplaŭdon de la plena partoprenantaro, kiam mi alvokis la laboristojn ke ni ne nur striku kontraŭ la ne-subskribo de la GLI, sed ke ni protestu kontraŭ la nigra salajro kiun ni ĉiu-

semajne ricevas.

Ne plu eblas ke ni laboristoj akceptu ke ni ricevu inter 100 ĝis 200 eŭroj semajne. Parto de salajro al kiu



ni ne pagas imposton (kiel dirite laŭ mi ne tiel grava) kaj sociala sekureco. Fakte akceptante la nigran monon, ni subfosas nian propran, per granda striko akiritan «Socialan Fonduson por Diamanto». 99% de la laboristoj voĉdonis favore al unutaga striko.

Loka televido intervjuis min 1 semajnon antaŭ la striko kaj mi jam kun klaraj frazoj aludis al la nigra salajro kaj ke tio estas unu de niaj decidaj punktoj. Neniu reago aŭdiĝis de la flanko de la estroj.

28an de januaro; jam je la 5h30 matene la unuaj strikantoj komencis bloki la diamantkvartalon en Antverpeno. Eĉ la plej ruzaj "flavuloj" ne sukcesis eniri la kvartalon kaj gravas scii ke estis nur kelkaj kontoristoj kiuj klopodis eniri la stratojn.

Je la 8a matene mi staris kun la prezidanto de la socialista diamantsindikato Donald Wittewrongel ĉe la fino de la ĉefstrato de la kvartalo kaj vidis tute malplenan straton. Eĉ rato ne kuraĝis eniri la kvartalon. Kiel malnovaj kamaradoj ni brakumis kaj deklaris la strikon absoluta sukceso.

Raportistoj de gazetaro vokis mian nomon, ĉar laŭ kolegoj mi estas la plej elokventa kaj kapabla kamarado kiu bone konas la historion de la diamantluktoj. Pluraj intervjuis min interalie ankaŭ la loka televido ATV (antverpena televido). Ankaŭ komerca televido VTM (Flandra televida asocio) petis intervjuon, sed mi rifuzis ĉar mi ne volas havi mian kapon en la elsendoj de komerca kaj sensacidirekta televido.

Vespere, lacega sed tre kontenta pri la striko, mi spektis televidon por vidi kion oni diras pri la striko. La nacia televido VRT, donis bonan respegulon de la striko, do ek al ATV. Ĝenerala bildo pri la striko-intervjuo kun la sindikatestrino de la katolika sindikato, kiu babilis nur pri la GLI kaj jen mia kapo sur la ekrano, dirante nur unun frazon: «ni ricevas ĉiun semajnon inter 100 ĝis 200 eŭrojn nigre». Punkto fino de la intervjuo.

La 29an de januaro je la 8a matene mi jam staris en la oficejo de la estro. Kiel freneze li kriis kontraŭ mi. Bedaŭrinde li forgesis ke mi havas unu el la plej fortaj voĉoj el la tuta diamantkvartalo kaj tuj mi vidis ke eĉ la pordoj kaj fenestroj devis kovri la orelojn pro la bruo.

Ni ambaŭ trankviliĝis kaj mi havis la eblon rakonti al la estro la plenan historion pri la intervjuo. Fine kvankam li bedaŭris miajn frazojn, li komprenis mian starpunkton kaj mi povis sidiĝi kaj labori.


Dum la paŭzo je tagmezo mi iris, kiel kutime en la straton. Eĉ ne ekster la pordo de la laborejo, iu idioto atakis min. Feliĉe mi ne estis tutsola kaj dank'al kamarado neniu grava batalo okazis. 20 minutojn poste fundamenta judo atakis min! Ankaŭ nun mi havis la avantaĝon ke li posedis pli da kuraĝo ol forto.

Irante hejmen, post laborhoroj, pluraj personoj buŝe minacis min el siaj "Mercedesoj" kaj "Jaguaroj". Mi jam estis preskaŭ 1 kilometron for de la diamantkvartalo kaj daŭre kelkaj idiotaj estroj minacis min. Frenezulo eĉ telefone minacis min.

La tagon poste mi iris al la estro kaj postulis demision. Evidente li ne akceptis ĉar certe li ne volas eniri ajnan lumĵetilon.

Ni atentu ĝis la supo ne plu estas varma, li diris. Mi proponas ke vi estu malsana venontajn du semajnojn por ke oni iom forgesu vin kaj ke trankvilo revenu inter la kampoj.

Mi scias nun ke mi ne estas heroo, certe ne preferas statuson kiel morta batalanto por la rajtoj de diamantprilaboristoj. Tamen mi restas ĉe mia retoriko pri nigra mono. Mi ne ĉesas kontraŭbatali tion. Eble mia frazo estas iom stranga, sed : "Mi volas mem decidi kiel mi trompas la ŝtaton rilate imposton. Mi neniam volas ŝteli monon de la sociala sekureco. Mi ne volas subfosi la batalon kiun faris



mia patro kaj onklo strikante 10 semajnon por ke ni nun havu bonan «Socialan Fonduson por Diamanto».

Kaj nun? Mi pensas pri la diro ke : «kiu multe minacas, ne estas danĝera»! Kaj esperas ke rapide la animtrankvileco revenos en la diamantkvartalon. Tio evidente nur eblos kiam la estroj subskribos la GLI.

La loka televido ATV invitis min partopreni rektan elsendon la 4an de februaro, sed kiam mi vidis ke mi havas afablan filinon, bonan edzinon kaj multege da laboro por mia idealo SAT kaj esperanto ĝenerale, kiam mi memoras ke mi promesis al Kreŝo ke mi post 2 jaroj, kiam mi espereble emeritiĝos, volas fari pli da laboro por SAT, mi nur devis decidi ne partopreni.

Mi volas batali por miaj laboristaj rajtoj, sed ne morti! Ne mi tro ŝatas la vivon, mi esperas ke neniu konsideras min malkuraĝulo.

2a de februaro je la 4a matene 2002

Jakvo

El la SAT-sidejo

67 avenue Gambetta
FR-75020 Paris
Tel: +33.1.47.97.87.05
Fax:+33.1.47.97.71.90
Rete: satesper@noos.fr

FONDUSO POR NOVA P.I.V.

Kiel vi jam estas informitaj, la laboro pri Nova PIV bone evoluas kaj ni esperas ke post kelkaj monatoj ni povos eldoni ĝin. Ĝi devus esti tute renovigita, ĝisdatigita kaj vere ilustrita, t.s. ke la ilustroj estos enkorpigitaj en la teksto mem.-
La eldonkosto de tiu nova ĉefverko de nia lingvo estos tre alta kaj pro tio ni decidis malfermi Fonduson por la eldono de tiu nova PIV.-Ĉiu esperantisto kiu deziras helpi en tiu entrepreno povas sendi monon al tiu fonduso.-La nomoj de kontribuantoj kaj sumoj regule aperos en Sennaciulo.-Se iu ne deziras ke lia/ŝia nomo aperu en tiu listo, ĝi aperos anonime.-La monon bonvolu sendi al la poŝtkonto de SAT :
n° 1234-22 K, Paris (en Francio)
n°-30041-00001-0123422K-020-39 (el eksterlando)
kun indiko "Por la Fonduso de Nova PIV".
Ni anticipe dankas al ĉiuj kontribuantoj.-

La P.K.-de SAT

FINIĜIS ANTAŬPAGO POR NOVA P.I.V.

Dum la kongreso en Nagykanizsa, SAT decidis fini la antaŭpagperiodon kun rabatita prezo por la nova PIV. Ekde ĝia apero oni povos aĉeti ĝin laŭ la normala vendoprezo. La definitiva vendoprezo kaj la aperdato de la nova PIV estos anoncitaj en la reto kaj en E-gazetaro.

HELPO

En Francio (€) Lagrange 12,00; P. Mary 12,00; R. Durand 32,00; J. Bes 12,00;
En Aŭstrio (€) M. Stuppnig 3,40; K. Karner 3,40; L. Patek 3,40; R. Jax 3,40; A. Straif 0,40;
En Svedio (SEK) G. Coste 220,00; P. Persson memore al Göte Landen 300,00; D. Levitan 90,00;
En Nederlando (€) M. Maatman-v.d. Starre 24,87; A. ter Braak 47,56; A. Noordewier-Jagtenberg 0,20; D. Krombeen 43,20; N. Vollegraaf-Hol 1,80; A.J.F. de Wit 138,31; B. Dodebier 1,80; G. v.d.Horst 5,20; R. Moerbeek 2,18;
En Britio (GBP) A. Prent 69,00; C. Archer 8,00; E.J. Wheatley 19,50;
En Portugalio (€) W. Sacramento 5,97; A. Kasesa 5,97;
En Germanio (€) Poppeck 1,00; Bues 51,00; Hocke 51,00; Rodewig 6,50; Bellen 51,00; Eberspächer 3,00;

SAT havas novan domajnadreson:
sat-esperanto.org

SOLENA INAŬGURO DE LA NOVA SIDEJO DE SAT-AMIKARO



Solena inaŭguro de la nova sidejo de SAT-Amikaro okazos **vendrede la 15-an de marto je la 15-a horo -** ĉefe por reprezentantoj de diversaj asocioj kaj la ĵurnalistoj.

Sabate la 16-an de marto okazos la tago de **«malfermita pordo»** inter la 10-a kaj la 18-a horoj por ĉiuj. Vizitantoj estas bonvenaj dum la tuta tago. K-do **Henriko MASSON** estos tie kaj povos subskribi sian libron: «La Homo kiu defiis Babelon». Krom li ĉeestos konataj francaj aŭtoroj:
André CHERPILLOD, aŭtoro de multaj verkoj en la franca kaj Esperanto.
Georges KERSAUDY, aŭtoro en la franca de la verko «Langues sans frontières» (Lingvoj sen limoj), eld. Autrement.
Yvonne LASSAGNE, aŭtorino de la verko «Que vive la langue française et que vive l'espéranto» (Vivu franca lingvo kaj vivu Esperanto). Eld. ARCAM.

Atentu: en la januara Sennaciulo estis eraro en la adreso. La bona adreso estas: **134 Boulevard Vincent Auriol, 75013 Paris,** metrooj: National aŭ Place d'Italie. Telefono: 01.44.24.50.48- fakso: 01.44.24.50.02.

NOVALIĜOJ

35.535 Decobert Jacques, 45 av. Béziou, FR-64140 Billère, Francio
35.536 *Sergejeva Lidija, Tarpenbenstr. 31A, De-20251 Hamburg, Germanio.
35.537 Ivanov Vjaĉesav, Petrodvorec, str. Halturina 15/2, ĉ. 69, RU-198504 S. Peterburgo, Rusio
35.538 *Charton Corinne, Route de Rians, FR-13490 Jouques, Francio
35.539 Vanden Bemt Marc, Arnoudt Rulenslaan 10, BE-3020 Herent, Belgio

El la ret@ SAT-diskutejo

Pli kaj pli da SAT-anoj posedas aliron al la Interreto kaj aliĝas al la SAT-debatejo, kiu ofte viglas. Por konigi al tiuj gekamaradoj kiuj ne posedas tiun eblecon pri tio kio okazas en tiu debatejo, nia kamarado Jakvo prezentas ĉi sube la resumon de la lastmonataj debatoj. Por aliĝi al la SAT-diskutejo bonvolu turni vin al la prizorganto, k-do Jakvo - **<pagadoro@skynet.be>**

Jam de iom pli ol unu jaro, SAT havas sian propran «agoron»* kie membroj povas diskuti, uzante interreton. Foje la listo estas viglega, alifoje tute lama. La jaro 2002 komenciĝis per la kutimaj novjarbondeziroj. La plej malagrabla novaĵo jam venis la unuan semajnon de januaro, la informo pri la morto de nia k-do Ivo Peyraut kiu ege tuŝis nin ĉiujn. Pri tio vi legis jam ĉion en S-ulo de februaro.

Rompis la silenton, post la malbona novaĵo nia *k-dino Tereza* kun demando pri supersignoj en la reto kaj Tibor pri frazelogio-esprimoj.

Ankaŭ en januaro venis sekva alvoko el Brazilo de *Johano*: ALVOKO POR KOALICIO KONTRAŬ KAPITALISMO KAJ KONTRAŬ LA KUNSIDO DE BID (Banko Interamerika por Disvolviĝado) EN FORTALEZO.

En marto 2002 okazos en urbo Fortalezo (Brazilo) granda kupola kunsido de BID (Banko Interamerika por Disvolviĝado). Ni ĉiuj scias ke ĉi tiu «financa agentejo» plenumas la klopodojn de la kapitalo por subaĉeti laŭ la interno de sia logiko la aŭtonomajn movadojn pere de la financado de «alternativoj por elimini la malriĉecon kaj por la disvolviĝado», laŭ la logiko de la internaciaj organizoj de la internacia kapitalo. Ne hazarde tio ĉi estas la ĉefa fonto de financado de la registaroj de tiel nomataj «popolaj demokratioj», de la oficiala maldekstro.

Ni pensas, ke ni devus, el la rezistado kiun ni ĉiutage faras kontraŭ la internaciaj organizoj serĉi plenumi tiujn ĉi kunordigitajn protestajn agojn kontraŭ ĉi tiu kunsido kiu estos la unua en ĉi tiu kategorio kiu okazos en Brazilo.

Ankaŭ el Brazilo venis informo pri: la aktualigita esperanta hejmpaĝo (TTT-paĝo) de CMI (SCA- Sendependa Centro de Amaskomunikiloj) kiun vi povas trovi per adreso : <http://www.midiaindependente.org/index.php3?lang=eo>http://www.midiaindependente.org/index.php3?lang=eo>. Ĝi estas esperantlingva.

Jakvo sendis mesaĝon en kiu li parolis pri la striko en la diamantmedio en Belgio, pri sia intervjuo antaŭ la televido kaj la atako kontraŭ sia persono. La teksto pri la evento aperas en S-ulo. Multegaj reagoj kaj subtenoj estis senditaj al Jakvo.

Viola havis demandon pri strangaj simboloj, kiuj aperas kiam ŝi ricevis mesaĝon de Nikolao. Tiu ĉi problemo poste solviĝis. — «Mi ŝanĝis mian litertipon al «Arial», kio estas tipo de eŭropa stilo» - diris Viola.

Jakvo demandis kial Viola volas adaptiĝi al eŭropaj normoj? Viola respondis, ke ŝi volas adaptiĝi al Esperanto, sed pro la fakto ke esperanto evidente havas eŭropan econ ŝi serĉis solvon en eŭropa medio.

Laŭ *Ronaldo* : «Estas tial ke mi opinias ke ni devus enkonduki vortojn de neeŭropa deveno, por aferoj ne jam elegante esprimeblaj per la ĝisnuna vortaro».

La 4an de februaro alvenis sekva mesaĝo: — «Hodiaŭ mi hontas, samideanoj, ĉar mi perceptis la perdon de granda oportuno partopreni la Mondan Socian Forumon, Porto Alegre-RS-Brazilo, por disvastigi tie informojn pri Esperanto. Mi opinias ke mi devus esti tie.—

Jozefo *Lunazzi*, kiu estis la sendinto, ankaŭ atentigis nin pri la ĉeesto de Noam Chomsky, la mondfama lingvisto kaj «dolĉa anarkiisto» kaj Rigoberta Menĉu, Nobel premiito pri paco kaj defendanto de indiĝenoj. Jozefo atentigis nin pri la valoro de kunvenoj kiel ĉi tiu en Porte Alegre kaj li ne komprenas ke asocioj kiel Brazila Esperanto Ligo, UEA, kaj aliaj ne partoprenas «Monda Socia Forumo-n»?

Reago de *Johano* estis: — «Atentu bone ke la oficiala maldekstro ankaŭ ne ŝatas esperanton. Partio de Laboristoj en Brazilo neniam sugestos uzon de Esperanto ĉar ĝi ricevus fortan kontraŭstaron de la sindikato de instruistoj de la angla lingvo. Partioj ne ŝatas perdi voĉojn.

La Socia Forumo de Porto Alegre estis organizita de la «oficialaj maldekstraj partioj» kiuj estis malfruantoj en la tutmonda movado kontraŭ kapitalismo kaj tutmondiĝo. Tiuj partioj ne volas la finon de kapitalismo sed ili volas «reformi» la sistemon por «plibonigi ĝin». Vera aŭtonoma rezista movado al kapitalismo okazos en Fortalezo en marto 2002 (en la sama loko kie okazos la UK) okaze de la kunsido de BID (Interamerika Banko por Disvolviĝado) kiam homoj protestos per REKTA AGO. Partopreno de esperantistoj en Marto en Fortalezo estus tre oportuna.

Renato atentigis nin ke: «Brazila Esperanto-Ligo kaj UEA partoprenis jam pasintfoje kaj ankaŭ nun!» Reagis *Emilo Mas*: «Ne timu, esperanto «ĉeestis» en Porto Alegre, almenaù en unu loko, ĉar iu intervenantino prezentis 8-paĝan tekston en la internacia lingvo (tradukita de *Katerine Roux* kaj li mem). Ni atendas raporton de tiu intervenantino por informi plie pri tio.

Du k-doj el Brazilo promesis verki tekston pri la temo por Sennaciulo (vidu ĉi tiun numeron).

Viola skribis la 4an de februaro: Mia antaŭjuĝo estis, ke SAT estas movado farita de eŭropaj blankahaŭtaj plenaĝulaj viroj. Ekzemple, en organo «La Juna Penso», mi sentis fortan econ de «maĉismo»(vira centrismo, esperante ?). Tamen ŝi konstatis dum sia vizito al Eŭropo ke ŝia antaŭjuĝo estis erara. Viola planas varbadon por SAT kun koreaj amikoj. Ili volas, neglektante la politikajn konfliktojn inter Koreo kaj Japanio, amikiĝi per Esperanto. Problemo estas, ke laŭ korea sperta esperantisto, koreanoj ne volas aliĝi al SAT ĉar: «koreanoj havas alergion al Rusio»!

Amiko el Tajvano surpriziĝis pri la SAT-aneco de Viola !!! Viola do eble prave diris ke ekzistas en Orienta Azio «malfeliĉa historia miskompreno pri SAT».

Jakvo respondis - «Kelkaj malamikoj de SAT, daŭre laŭtparolas pri SAT-komunismo. Tamen, tiuj kiuj bone konas la historion de SAT, scias ke Lanti siatempe havis dubojn pri la sistemo en Ruslando. Stalinismo ne estas komunismo, vi scias tion, kaj ĉiuj kiuj estas honestaj scias tion. — Ne povas esti miskompreno pri tio kio estas SAT, se oni volas fari la penon legi la statuton de SAT. Neniu partipolitiko havas la potencon en SAT. La «malfeliĉa historia miskompreno» pri kiu vi parolas estas, laŭ mi, nur obstineco de malamikoj de SAT.

Tibor skribis, ke estus bone ke homoj unue informiĝu por ke ili ne eraru aŭ konfuziĝu. - Zamenhof neniam diris: «ke

nur politikistoj, anarhistoj, belulinoj, eŭropanoj, kristanoj, blankhaŭtuloj ktp. rajtos uzi la de li kreitan lingvon!» — Li ankaŭ parolis pri la tempo, ke— hungarano multon spertis pri komunismo ĝis 1989.... kaj ankaŭ poste. «Eĉ mi partoprenis en Rusio, Moskvo, la 73-an SAT kongreson en 2000, kaj mi havis la eblecon vidi la NUNAN rusan vivon kun iu persono, kiu vidis tion antaŭ jardekoj. En la granda magazeno GUM en Moskvo oni jam tute ne vidas rusajn reklamilojn. Sur la pluretaĝaj domoj estas reklamitaj la japanaj kaj koreaj aŭtomobiloj, ktp. Simile estas en Hungario.

Djemil atentigis nin pri sia teksto kiu aperis antaŭ du jaroj en S-ulo, en kiu li pritraktis la temon: «La malbonfarto de SAT (i.a.) estas, unue, la rezulto de eksteraj cirkonstancoj. Nuntempe, post la fiasko de laŭdira socialismo (aŭ komunismo) kaj la tutmonda (kaj provizora) venko de la liberala sistemo, ĉiuj asocioj, kiuj celas homan emancipadon, fartas malbone. Sed, tiuj objektivaj cirkonstancoj ne estas solaj, ĉar ni partoprenas en ili. Do, ekzistas ankaŭ subjektivaj cirkonstancoj : Ni, nia konduto, niaj konceptoj, nia kapablo ilin kontesti, kontesti nin. Kompreneble oni ne povas kontesti la eksteran mondon se oni ne kapablas, unue, iom dubi pri si mem.

Jakvo skribis pri la multtendenceco kiu estas la forto de SAT, al kiu *Johano* reagis: «Mi esperas ke ĝi estas multtendenca ĝis certa limo. Estus absurde se SAT estus loko por dekstraj anarkiistoj aŭ anarko-kapitalistoj, ĉu ne?

Jakvo referencas al la statuto de SAT kiu donas ĉiun respondon pri kio estas SAT.

Johano respondis: «Jakvo, la problemo ne estas legado de la statuto sed ĝia interpretado. Universitatoj ankaŭ leĝe estas nomataj klerigaj, edukaj kaj kulturaj organizoj. Kaj se mi bone memoras antaŭ nelonge estis enketo por ŝanĝi la statuton de SAT, kio feliĉe ne okazis.

La ĉefa punkto de la statuto estas ke: «SAT sur kiuj sin apogas la diversaj klasbatalaj laboristaj partioj kaj sindikatmovadoj, per komparo de faktoj kaj ideoj, per libera diskutado ĝi celas malebligi ĉe membroj la dogmiĝon de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj».

Mi certe dirus ke SAT estas «maldekstra» asocio. Laŭ Noam Chomsky, la nuna koncepto pri maldekstro estas: ĉio kie oni kunlaboras por la organizado de la subprematoj kaj popoloj.

Tibor petis: Ĉu vere? SAT estas «maldekstra» organizo?? Li ankaŭ aldonis ke la vorto «maldekstra» malbone sonas en Hungario kaj ke li preferas ke ni nomu SAT —»multtendenca kaj progresema» alian ne, ĉar tiam, se ni komencos diskuti pri dekstra kaj maldekstra, centra ktp.. politikaj flankoj, kien tio gvidos nin.»

Respondo de *Johano* al *Tibor*: Laŭ la ideo de Noam Chomsky pri moderna koncepto de la vorto «maldekstro» jes, SAT estas maldekstra asocio. Aŭ ĉu vi pensas ke ĝi estas dekstra?

Kaj al *Jakvo*: la vorto multtendenca ne plaĉas al mi ĉar dekstraj asocioj ankaŭ povus esti multtendencaj. Pri la vorto progresema, ĝi ankaŭ estas dubinda: ĉu emo al progreso? — La dekstruloj ne volas ke la popoloj organiziĝu. Maldekstro estas sistemo kiu volas malkaŝi ke en nia mondo estas subpremantoj kaj subprematoj. La dekstro intencas kaŝi tion.

La 5an de februaro, *Johano* sendis mesaĝon pri la «atenco» per dolĉa kuko, kontraŭ Marie-George Buffet, kiu ankaŭ estas «dolĉa» virino kaj membro de la Komunista Partio. La celo estis «donaci» al ŝi kukon omaĝe al la partopreno de Francio en la milito kontraŭ Afganio.

Reage al diskuto pri dekstre kaj maldekstre, Jakvo skribis: malsamecojn en determinoj ni devas venki por iĝi bonaj esperantistoj.

Rilate SAT, por mi ekzistas nur la statuto al kiu mi povas referenci kaj vi scias ke statuto estas kiel la korano aŭ biblio, la frazoj estas fiksaj sed la interpretado malsama laŭ la kredo kaj la homoj kiuj legas. Ĉi tiu problemo neniam solviĝas.

Mesaĝo de *Viola*: «Tiu kiu volas kompreni» estas pasivtendenca. Dum SAT atendadis tiel, junuloj malmultiĝis en SAT, kaj la organizo ne tre sukcesis akiri novajn kamaradojn, ĉu ne ?— Por mi mem «klasbatalo», «laboristo» kaj «burĝa» estis ne tre kutimiĝintaj vortoj. Tial, por kompreni tion «kio estas SAT» al junaj generacioj aŭ novaj esperantistoj, historiaj/ politikaj terminoj estas ne tre efikaj, miaopinie. Oni ne povas tre bone kompreni kiel ĝi rilatas al si per tiaj vortoj. Speciale por homoj kiuj jam ripete aŭdis maltaŭgajn informojn de antaŭuloj, fiksrigardi veron malkovri irante al unuafoja penso per sia kapo, estas certe tre malfacila.

Ronaldo reagis: — Sperti la inkvizicion ne signifas ke oni scias kion entenas kristanismo.

Por bone kompari la sistemojn eksperimente, oni devus krei (almenaŭ) du landojn, kun kompareblaj grundoj, mineraloj, klimatoj kaj edukiteco, kaj efektive bari ĉiajn iliajn en- kaj eksportojn.

Aliflanke, la eksperimentoj en la oriento (ĉu ili meritas la nomon komunisma/socialisma aŭ ne) daŭris nur kelkajn jardekojn. La kapitalismo ekzistas jam dum jarcentoj, kaj - tute laŭ la teorio - Ĝi kaŭzis ke iuj ege riĉas kaj ke multe da aliaj vivas en mizero.

Bela sendis sekvan mesaĝon:— Mi ne scias, kiel vi opinias, ĉu SAT bezonus reformojn? Ni devus malfermi pordon antaŭ la tutmonda esperantistaro. Jes mi jam aŭdas la riproĉon de multaj listanoj: Ja, SAT estas malfermita antaŭ ĉiu. Prave, sed tamen en la kapojn ennestiĝis: SAT estas komunista, maldekstrula, ateista organizo.

Mi demandas: kio okazus, se ni celus ankaŭ la religiemajn esperantistojn (precipe laboristojn) kaj proponus al ili pacan kunlaboron.

Laŭ mi tio ĉi ne insultus la ideon de k-do Lanti.

Mi estas konvinkita ke ankaŭ li samopinius.

***

Jen rigardo pri kio okazas en la diskutejo de SAT. Certe ni ricevos pri la plej gravaj aferoj lerte verkitan tekston por Sennaciulo.

Mi esperas ke la superrigardo iom donas bildon pri tio kel ni vivas en SAT. Ankaŭ gravas ke k-doj, ne ligitaj al la reto donu sian opinion pri temoj kiel ĉu SAT estas komunista, ĉu ni havas aliĝintojn el di-kredantoj, ktp. La ideo estas ke estonte ni donu ĝeneralan bildon pri la diskutoj en interreto, kiu, kiel dirite, de tempo al tempo ege viglas kaj foje tute lamas.

Amike Jakvo

NEKROLOGO

Nur nun ni eksciis ke la 9-an de oktobro 2001 mortis en Kobe (JP), nia kamarado

MATUMOTO Kiyosi
(matr. 32.527)

Ni kondolencas al familianoj kaj liaj geamikoj.

***

En Hengelo (NL) mortis la 27-an de januaro 2002, 81-jara, nia malnova membro, k-do

Jan G. KUSTER
(matr. 31.653)

Ni kondolencas al la familianoj kaj geamikoj.

***

En Roterdamo (NL) ĵus mortis 98-jara, nia malnova membro, kamaradino

Lena QUISPEL
(matr. 29.129)

Ŝi estis edzino de k-do Wim, kiu longe zorgis pri Sennaciulo en Roterdamo.
Ni kondolencas al la bogefratoj kaj aliaj familianoj.

***

En Huskvarna (SE) mortis la 3-an de februaro, 77-jara, nia malnova kaj fidela membro, k-do

Göte LANDEN
(matr. 27.336)

Ni kondolencas al lia edzino, nia k-dino Else, lia filino kaj al tuta familio. Li estis motoro de la klubo en Huskvarna kaj li ofte prezidis la jarkunvenojn de SLEA, lastfoje en majo 2001.



SOLIDARECO?... TAMEN JES.

Gazetoj, amasinformiloj, politikistoj, komerc-reklamistoj kaj alispecaj belparolantoj malavare distrumpetas per kortuŝe sonantaj vortoj, kiaj : amo,interhelpo, homrajto, bonkoreco, solidareco, ktp.... kiuj evidente kortuŝas multajn homojn. Sed ĉu tiujn sence noblajn terminojn ili ĉiam uzas por same noblaj celoj ? Nuntempe por pravigi la militon en Afganio G. W. Busch, la Usona prezidento, prezentis ĝin, kiel «lukton de la Bono kontraŭ la Malbono» kaj vokis al «Solidareco de la demokrataj popoloj». Ege lertaj estas la politikistoj en la arto tiel uzi substantivojn en ĝenerala senco, intence evitante aldoni kvalifikojn precizigantajn ties ĝustan signifon. Kia Bono? Ĉu ĝi estas sama por riĉulo, kiel por malsatanto? Por bombardanto, kiel por bombardato ?

KARITATECE - Karitato: «la tria el la teologiaj virtoj, per kiu kristano amas la proksimulon, kiel sin mem pro amo al Dio!" (P.I.V.), Nekontesteble altvalora sinteno! Teorie, tutcerte jes; sed en la realo? Jen kelkaj personaj spertoj :

Dudek-dujara lernanto ĉe laika vilaĝlernejo mi bone sukcesis kaj konkurse gajnis monhelpon por daŭrigi studadon ĉe laika duagrada lernejo. Tiam la riĉega bienposedantino, sur kies bieno dunge laboris mia malriĉa patro, alloge proponis al ĉi lasta alpreni sur sin ĉiajn elspezojn por plia studado en porpastra seminario. Ege alloga por malriĉulo ! Feliĉe mia patro, konvinkita laikulo, malakceptis. Se ne mi nun estus emerita pastro. Ĉar tiuj riĉuloj posedis plurajn bienojn, kaj iris de iu al la aliaj per aŭtomobilo «Hotchkiss» – la nura tiuepoke (1927) en la vilaĝo – plurfoje ilia elveturado koincidis kun fino de libertempo, kaj tial eblus al ili transporti min al mia duagrada lernejo, en Angoulême, urbo kiun ili devige traveturis. Neniam ili proponis...

Originala koncepto pri karitato ! Karitato religia, ĉar tiu riĉulino fervore vizitis preĝejon, kie ŝi havis rezervitan sidlokon. Kaj krome ŝi havis «siajn» malriĉulojn, al kiuj ŝi ne forgesis donaci kelkajn monerojn. Danke al tio ŝia konscienco tute trankviliĝis.

Eĉ foje «ŝajne» donacis : Kiam mia patro mortis, nur kvardek-okjara, ŝi volis, ke ŝia fidela servisto por lasta vojaĝo iru en luksa ĉerko el kverko, kiun ŝi mem pagos. Noblanima gesto, ĉu ne. Sed ... post pluraj monatoj, mia malriĉa patrino, devis pagi tiun ŝuldon al la koncerna metiisto. Eble la riĉa mastrino forgesis... Kvankam, en tiaj cirkonstancoj !... Ŝi povus esti escepta kazo, ĉu? Sed, ... legu plu.

PLI ĜENERALE

Mi do fariĝis instruisto, laika instruisto. Mia unua instruposteno situis en Vendeo, franca departemento ankoraŭ nun submetita al eklezia «diktatoreco», kion trafe scias k-do H. Masson. Tio ebligis al mi pli profunde kaj ĝuste taksi realecan signifon de karitato laŭ la religia koncepto. Do freŝe alveninta en la vilaĝon St Denis du Payré, mi surstrate renkonte preterpasis la lokan pastron, kaj naive lin ĝentile salutis. Nur fulma rigardo respondis. Feliĉe la okuloj ne estis pafiloj, se ne mi ne povus tion raporti ! «Amu proksimulon», ktp.,.. !

Mia instruista kolego, denaska Vendeano, aŭdante pri tio tute ne miris. Li sciigis min, ke en vilaĝeto situanta ĉe la distrikta heĝa kamparo, kie la homoj precipe bredas bovinojn, sed estas fidelaj preĝejvizitantoj, al juna instruistino laika, ĉiuj malakceptis vendi lakton por ŝia kelkmonata bebo; kaj la panvendisto rifuzis al ŝi vendi panon. Ŝi estis devigata bicikli dek kilometrojn por provizi sin per necesaj varoj. Tiel okazis dum la jaroj tridekaj. Ĉu okazis ŝanĝiĝoj de tiam? Mi dubas, surbaze de freŝdataj informoj.

En Artigues près Bordeaux, kie finiĝis mia instruista kariero, al infanoj, kies ege malriĉaj gepatroj ne povis pagi, oni rifuzis manĝaĵon ĉe la urba lerneja restoracio, laŭ decido de la responsulino, tamen pia ĉiudimanĉa praktikantino. Mi devas aldoni, ke la urbestraro konsistis entute el dekstruloj, kio povas esti interesa detalo en la afero. Ho! mi scias, ke ekzistas,verŝajne multaj sincere sinoferemaj religiul(in)oj kaj dikredantoj; sed kiel distingi ilin de la ne malpli multnombraj, kiuj hipokrite misuzas ĝin ? Iu franca proverbo diras : «Charité bien ordonnée commence par soi-même» (Trafe elpensita karitato unuarange profitas al si mem). Antaŭ kelkaj jaroj, informo dissendita de radio frapis min. Dum luksa akceptado ĉe riĉaj potenculoj, la tutmonde famkonata religiulino, F-ino Tereza, laŭ la interpreto diris «Nu, por praktiki karitaton, necesas ja ke estu, mizeruloj!» Pripensige...

SOLIDARECE -

Mi persone konas Glynn Roberts, filon de nia k-ino Ruth Roberts, kiu raportis pri sia trijara sperto en Ŝtata helporganizo por la Tria Mondo. Sub la titolo «Kiel helpi la trian mondon» ĝi estas havebla en Esperanta lingvo ĉe la broŝurservo de S.A.T. Instruplena legado por konscii, al kiuj reale profitas tiu oficiala helpo. Danke al ĝi, Houphouet-Bouagny en Ebura Marbordio konstruigis orumitan katedralon en sia naskovilaĝo; Mobutu el Zairio akiris dekon da luksaj kasteloj tra la mondo; Bokasa el Centrafrika Respubliko malavare donacis amason da diamantoj al la franca respublikprezidento Giscard; por citi nur kelkajn konatajn francajn ekzemplojn. Kaj en tiuj afrikaj landoj ĉiujare dekmiloj da infanoj malsatmortas.

Kaj kion dedukti el la sinteno de la riĉegaj firmaoj, kiuj rifuzis liveri je modera prezo medikamentojn por flegi la A.I.D.S.-malsanulojn en Sud-Afriko ?


Freŝdate aperinta artikolo en nia loka informĵurnalo «Sud-Ouest» (la 4an / 01 / 2002) klarigas, ke plejmulto el la centoj da milionoj da frankoj kolektitaj de la fonduso R. Follereau por laŭstatute elradikigi lepromalsanon en Afriko, reale estis disdonacitaj al la Papo, al la episkopoj, al katolikaj asocioj.

Samtage en sama ĵurnalo aperis alia artikolo pritraktanta la financan fraŭdon en Francio, kie la riĉuloj elportas sian monposedaĵon al tiel nomataj «paradizaj fiskaj landoj» por ne pagi imposton en propra hejmlando... Solidarece, ĉu ne ?...

HUMANECA INTERHELPO -

Ĉu la supre menciitaj faktoj nepre konduku al pesimisma konkludo, ke solidareco entute malaperis. Miaopinie tute ne. Tamen rimarkinda fakto estas, ke ĝi plejofte montriĝas spontanee, ĉe malriĉaj popolanoj kun modestaj vivrimedoj, sed kies humaneca koro ankoraŭ ne transformiĝis en ... monŝrankon ! Admirindaj «eksterregistaraj organizoj» (franclingve : O.N.G.) kiaj : Senlandlimaj kuracistoj, Amnestio Internacia, Popola Interhelpo, Katolika Interhelpo, kaj multaj similaj plenumas laŭdindan taskon, subtenataj finance de memvolaj, donacaĵoj fare de senteme bonkoraj personoj. Okaze de katastrofoj, ĉu naturaj, ĉu alispecaj, eblas konstati, ke solidarecosento ankoraŭ pluvivas ĉe multaj homoj. Ni do ne malesperu...

L. Robert



75-a KONGRESO DE S.A.T. ALICANTE (ES) 1-7.07.2002

Organiza Kongresa Komitato :
Prezidanto: Martin Bustin Benito, Apt° de Correos 4143, ES-03080 Alicante.
Tel. kaj Fakso: 00.34.965184596
Rete: <marteno@ctv.es>
Bankkonto: Martin Bustin Benito,
BBVA 0182-0102-16-0203052953.
Sekretariino : Liya Maziy (sama adreso)


Kotiztabelo en €

Kategorio	Ĝis 31.03.2002	31.05.2002	Poste
SAT-membro	55,38 €	66,15 €	76,92 €
SAT-geedzoj	89,23 €	106,15 €	123,08 €
SAT-gejunuloj (15-25j)	27,69 €	33,08 €	38,46 €
Gasto	70,77 €	81,54 €	92,31 €
Gastoj-geedzoj	112,31 €	129,23 €	146,15 €
Gastoj-gejunuloj (15-25j)	36,92 €	43,85 €	50,77 €

Infanoj (ĝis 15 j) ne pagas kotizon.

- ❑ La supre menciitaj kotizoj (kategorio A) validas por la partoprenantoj el la landoj de Eŭropo ne sube menciitaj kaj el Aŭstralio, Israelio, Japanio, Kanado, Usono, Korea Respubliko, Sudafriko.
- ❑ La partoprenantoj el CZ, HU, PL, SK, SI (kategorio B) ĝuas 40% rabaton.
- ❑ La partoprenantoj el AL, BG, RO, eksa SU, eksa YU krom SI kaj ĉiuj afrikaj, amerikaj kaj aziaj landoj krom supre menciitaj (kategorio C) ĝuas 60% rabaton.

KELKAJ INFORMOJ



ALVENO

La kongresontoj kiuj anoncos la daton, horon kaj lokon de sia alveno, estos atendataj kaj helpataj.

VIZOJ

Tiuj, kiuj bezonos invitleteron por havi vizon, bonvolu sendi al la O.K.K. la sekvantajn informojn:
- Nomo kaj antaŭnomo
- kompleta adreso
- dato kaj naskiĝloko
- numero de pasporto
- pasporta dato de valideco
- kiu aŭtoritato ĝin eldonis
- civitaneco kaj profesio

PRELEGOJ

La prelegontoj bonvolu sin anonci kiel eble plej rapide por esti programitaj. Se vi povas helpi mone ne forgesu niajn kamaradojn el malriĉaj landoj. Alikanto havas la piedojn ĉe la Mediteranea maro. Ne forgesu vian bankostumon.

POR LA PATRO

Okaze de la forpasa ceremonio omaĝe al Ivo Peyraut, filino lia franclingve legis poemon de Eluard. Ĝia lasta strofo tiel ĝuste reeĥas lian filozofion kaj tiun de SAT, nedisigeble ligitajn, ke iĝis devo traduki ĝin en la lingvon de ĉiuj SAT-anoj. Ilia indulgo estas petita pro la monotona amfibrakaro, kiu ne ĉiam kongruas kun la pli glita ritmo de la liberaj versoj de Eluard. Sed la majesto de ĉi tiuj piedoj ŝajnis tamen taŭgi al la severa soleno de tiu horo.

***

Grenkampoj plugiĝas, fabrikoj radias
Kaj nestas la semoj en globo grandega
Multuloj prifestas tritik- aŭ vinberan rikolton
Nenio nur simplas, nenio apartas
Rebrilas la mar' en l' okuloj ĉielaj aŭ noktaj
L' arbaro al arboj donacas sekuron
Kaj ĉiuj dommuroj ŝirmiĝas sub haŭto komuna
Kaj voj' senĉese sin interkruciĝas.
Kompreno senpera ja estas la homa destino
Kompreno kaj amo
L' infanoj de l' homoj plu naskos aliajn gepatrojn
Kun idoj liberaj el hejmo aŭ lando
Kapablaj inventi plenhoman homecon
Estonte kreantaj el Tera naturo
l' eternan patrujon de l' tuta homaro.

Elfrancigis Johán'Luko, 15/01/2002

Solvo de krucenigmo de februaro :
Horizontale : 1. sennaciismo; 11. klient; 12.diin; 13. utero; 15. led; 16. lili; 17. ludil; 19. pro; 20. kuracao; 22. ti; 23. planti; 24. araneo; 25. se; 26. raporto; 28. ber; 29. nenio; 30. vaka; 31. akr; 32. minac; 33. laik; 35. tirani; 36. Eŭgeno Lanti.
Vertikale : 1. skulptur; 2. eltiri; 3. nielo; 4. neri; 5. ano; 6. ct; 7. id; 8. silici; 9. miela; 10. ond; 14. turneo; 17. luanto; 18. dato; 20. klarig; 21. operacii; 23. pron; 24. aperig; 25. sekant; 27. ankaŭ; 28. banan; 30. vira; 31. ale; 32. mil; 34. ke; 35. to.

S.A.T.  erinaco

DISTRA PAĜO POR SERIOZAJ SAT-ANOJ

POR JUNAJ SAT-ANOJ

1	2	3	4		5	6	7	8
9				■	10			
11			■	12				
13		■	14		■	15		
	■	16			17	■	18	
19						20	■	
	■	21						
22	23	■	24				■	
25		26	■	27		■	28	
29			30		■	31		
32				■	33			
34								

(R) - Radiko de la vorto.

Horizontale : 1. Studo pri la kaŭzoj de la malsanoj; 9. Konata fiŝo (R); 10. Granda rabobesto (R); 11. Prepozicio; 12. Prilabori per tranĉa ilo pecon da ligno aŭ metalo; 13. Simbolo de ejnstejnio; 14. Simbolo de stroncio; 15. Mallongigo de la iama Instituto por Oficialigo de Esperanto; 16. Komenci batalon (R); 18. Simbolo de radono; 19. Distingilo de io (R); 21. Rilata al la antikva literaturo; 22. Kemia simbolo de tantalo; 24. Rivero en Rusio (R); 25. Sufikso signifanta doktrinon aŭ sistemon; 27. Landokodo de Tunizio; 28. Singulara pronomo; 29. Malgranda lumĵetilo; 31. Plej malalta vira voĉo (R); 32. Senti impreson de surprizo pro io neatendita; 33. Esti en dumnokta senaktiveco (R); 34. Homo kiu elfaras gipsajn aldonaĵojn por arkitektaĵoj.

Vertikale: 1. Penado por disvastigo de la internacia lingvo: 2. Ostaro de la piedradiko (R); 3. Persona pronomo; 4. Unuo de elektra rezistanco (R); 5. Grekdevena scienca vorto signifanta orelon; 6. Rondire turniĝi; 7. Konscie preterlasi ion (R); 8. Scienco pri la popoloj kaj lingvoj de Oriento; 12. Satelito; 14. Karakteriza maniero de esprimo; 16. Difinita parto de kurbo (R); 17. Sako el ŝtofo, por dormi sur ĝi (R); 20. Parto de herbecaj plantoj (R); 23. Fervore deziri al io bona (R); 26. Preme malĝojiga, malhela (R); 28. La tria monato de la jaro (R); 30. Determina adjektivo esprimanta la kvaliton; 31. Reliefa ornamo sur la ekstera surfaco de muro (R); 33. La superhoma kultata estaĵo (R).

I. Moĉilnik